

El fervoja mondo 6/2014

Belgio: Averta por transporto de danĝeraj kaj naŭzaj materialoj

Eŭropa Komisiono petis Belgion, ke ĝi harmoniigu siajn enlandajn jurpreskribojn pri surtera transporto de danĝeraj kaj naŭzaj materialoj. Laŭ Komisiono la lando ĝis nun ne reĝustigis enlandajn leĝpreskribojn koncerne kemiajn materialojn, gasojn, naftoproduktaĵojn aŭ eksplodaĵojn en koincido kun Direktivo 2008/68 ES el jaro 2008. La direktivo difinas unuecajn kondiĉojn por transporto de danĝeraj kaj naŭzaj materialoj sur ŝoseo, fervojo kaj enlandaj akvovojoj sur teritorio de landoj EU.

Britio: Kargokompanio grave reduktos kostojn sub Maniko

Kompanio *Eurotunnel* decidis redukti kostojn de fervoja vartrafiko ĝis **50 procentoj**. Tiu ĉi dispono celas subteni transporton de varoj sur reloj inter Francio kaj Britio. En jaro 2013 kreskis totala trafikamplakso de fervoja vartrafiko en la tunelo **je 10 procentoj**, en unua kvaronjaro 2014 **je 13 procentoj**. Inter 23-a kaj 7-a horoj kostoj krome estos reduktataj **je pliaj 25 procentoj**. La kompanio promesis, ke ĝis fino de la jaro 2018 kostoj por vartrafiko ne kreskos.

Ĉeĥio: ĈD railjet ekveturis kun pasaĝeroj



Mardo, la 6-a de majo 2014 enskribiĝis en historion de moderna fervoja trafiko en Ĉeĥio. De ĉefstacio en *Praha* ekveturis por sia unua veturo kun pasaĝeroj trajnkompleto *Siemens Viaggio Comfort*, alie ĈD railjet kiel trajno *IC 571* al *Břeclav*. Enkonduko en provekspluatadon kun pasaĝeroj en enlandajn kursojn antaŭis komencon de internacia ekspluatado inter *Praha* kaj *Wien* en unua duono de junio 2014.

Ekde nova horaro, kiu komencos validi 14-an de decembro 2014, komenciĝos regula ekspluatado de trajnoj *railjet* en kurso *Praha – Brno – Wien – Graz*. Laŭ komuna projekto de Ĉeĥaj fervojoj ĈD kaj Aŭstraj federaciaj fervojoj *ÖBB*, en unuigita nivelo de komforto kaj servoj, sub komerca nomo *ČD railjet*, respektive *ÖBB railjet*, sur trajnkurso *Praha – Wien – Graz* kaj reen veturos ĉiun tagon trajnparoj gvidataj en

internacia trafiko en duhora kadenco. Vojaĝtempo inter *Praha* kaj *Wien* estos reduktita al ĉirkaŭ 4 horoj kaj 10 minutoj. La trajnoj *EC* estos gvidataj sen deviga rezervado de sidlokoj krom en la klaso *business class*. La

trajnoj *railjet* en *Wien* haltos en nova ĉefstacio, kie vojaĝantoj havos garantiatajn kunligojn al aliaj direktoj, sen transiri inter vienaj stacioj. Trajnoj de viena ĉefstacio tiel veturos ekz. al *Budapest*, *Villach*, *Salzburg*, *Frankfurt (Main)*, *München*, *Zürich* kaj ankaŭ al la viena flughaveno *Schwechat*.. Danke al sinsekvaj liveroj, jam dum septembro 2014 ĉiun tagon ĝis po tri aldonaj trajnparoj *railjet* estos enkondukataj inter *Praha* kaj *Wien* kiel trajnoj *EC 72 – 77*.



Ĉinio: Liverado de motoroj por plilongigita metroo

Pli ol kvardek vagonkombinaĵoj por metroo en ĉina urbo *Suzhou* ricevos motorojn de ĉeĥa kompanio *Škoda KingwayElectric*. Kontrakto en valoro 1,1 miliardoj da ĉeĥaj kronoj (ĉirkaŭ 39,3 milionoj da eŭroj) estis subskribita en marto 2014, la unua kombinaĵo el la nove subskribita mendo komencos trafiki sur nova linio de la metroo en venonta 2015-a jaro. Plimulto de veturiloj estos liverata ĝis la jaro 2016. Planitaj kombinaĵoj por la metroo estas sesvagonaj (ĝis nun trafikis kvinvagonaj). Postulas tion ankaŭ senĉese kreskanta nombro da vojaĝantoj, estos do pligrandigitaj stacioj kaj plilongigitaj pasaĝerkajoj.

Eŭropa Unio: Kunordigantoj kontrolos transeŭropajn koridorojn

Eŭropa Komisiono nomumis dekunu kunordigantojn por ĉiu el naŭ koridoroj de ĉefa reto enkadre transeŭropa trafika reto *TEN-T*. Nomumitaj estis ankaŭ kunordigantoj de la komandosistemo *ERTMS*, kaj de t.n. maraj longlinioj *Motorways of the Sea*. Kunordigantoj respondos pri gvidado de la projektoj kaj organizos sinsekvajn publikajn informkunvenojn pri okazanta laŭprojekta laboro. En nelasta vico ili alportu rekomendojn por plua optimumigo je kunligo de la trafika infrastrukturo kun koridoroj.

Francio: Regionaj rapidtrajnoj en supreniĝo danke al kvalito

Interesiĝo pri francaj regionaj trajnoj de kategorio *TER* kreskas ekde ilia enkonduko en priservon de la regionoj, kiu okazis en jaro 2002. Nombroj de iliaj pasaĝeroj kreskis je 55 procentoj. Kresko estas kunligita kun kreskanta kvalito de la trajnoj. Regionoj ekde la jaro 2002 por novaj trajnkompletoj kontribuis per 9 miliardoj da eŭroj. Horaro de regionaj rapidtrajnoj *TER* atingas akuratecon 92 procentoj. Kompanio *SNCF* planas pliiĝi ĝin al 93 procentoj, kaj komune kun regionoj ne ĉesigas investojn. En ekspluatadon venas motorvagonkombinaĵoj tipoj *Regiolis* kaj *Regio2N*.

Germanio: DB en jaro 2013 transportis 2 miliardojn da vojaĝantoj

Nombro de pasaĝeroj, kiuj en jaro 2013 uzis servojn de Germana Fervojo *DB* kompare al antaŭaj jaroj kreskis. *DB* en la jaro 2013 transportis pli ol du miliardojn da vojaĝantoj, kio signifas kreskon je 42 milionoj pli ol en jaro 2012. Tio okazis malgraŭ malsuprenigita kresko de ekonomio, kreskantaj prezoj de energio kaj negativaj influoj de ŝtormoj kaj inundoj. Kvankam nombroj pri kresko povas aspekti optimismaj, plenumo de difinitaj ekonomiaj celoj okazis nur parte.

Hungario: Dek vagonkombinaĵoj Flirt liveritaj en flava-verda koloro

Livero de unuaj kvar motorvagonkombinaĵoj *Flirt* de fabrikisto *Stadler* venas unu post la alia. En unua duono de januaro 2014 aŭstro-hungara fervoja kompanio *GYSEV* transprenis vice jam trian, kaj en februaro kvaran kombinaĵon en verda-flava koloro. Komenciĝis ankaŭ livero de pliaj ses kombinaĵoj el dua mendo. Entute do venos dek novaj vagonkombinaĵoj. Vagonkesto de tiuj ĉi veturiloj estas fabrikata en *Szolnok*, en filia entrepreno *Stadler*, elektran ekipaĵon la veturiloj ricevas el Pollando, fina funkciigo okazas denove en Hungario.

Italio: Duetaĝa vagonkombinaĵo Vivalto priservos Lombardion

En milana stacio *Centrale* estis prezentata unua el entute 63 duetaĝaj vagonkombinaĵoj *Vivalto*, kiuj estas destinitaj por regiona operatoro *Trenord* en teritorio Lombardio. La trajnkompleton por rapido 160 km/h prezentas ses klimatizataj duetaĝaj pasaĝervagonoj *AnsaldoBreda TSR* kaj unukondukisteja elektra lokomotivo *Bombardier E464 Traxx*. La mendo valoras 500 milionojn da eŭroj. En junio 2014 trafikis jam ses trajnkompletoj. Restantaj estos liverataj ĝis komenco de jaro 2016.

Litovio: Ĉeĥa kontribuo por konstruo de koridoro Rail Baltica

Kompanio *AŽD Praha* subskribis kontrakton por kompletigo kaj modifo de regaj kaj sekurigaj teknologioj por litova fervojo sur linio *Kaunas – Kazlu Ruda*. La mendaĵo valoras pli ol 43 milionojn da ĉeĥaj kronoj (1,55 milionojn da eŭroj), kaj estas parto de rekonstruata koridoro *Rail Baltica*. Alikonstruo enhavas i.a. kvar elektronikajn regejojn *ESA 11-LG* kaj elektronikan aŭtomatan blokadsistemon *ABE-1-LG*. Konstruo de la koridoro englutos 3,2 ĝis 3,7 miliardojn da eŭroj, el tiuj ĉirkaŭ 550 estos investataj sur teritorio de Litovio, kie la koridoro entenas linion longan 335 kilometrojn.

Turkio: Sekurigaj sistemoj evoluas

En Istanbul 1-an ĝis 3-an de aprilo 2014 sub patroneco de Internacia Fervojunio kaj Turkaj Ŝtataj Fervojoj *TCDD* okazis vice jam 11-a konferenco *ERTMS*. Ĉefa temo de la konferenco okupis sin pri optimumigo de enfervojaj investoj. Partoprenantoj komence de la aranĝo vizite intrerkonatiĝis kun submara fervoja tunelo *Marmaray*. En du tagoj okazis prelegoj kaj diskutkunvenoj pri plua evoluigo de la komandosistemo *ERTMS* kaj pri ĝiaj du ĉefaj partoj – trajnsekurigsistemo *ETCS* kaj radiofonio-reto *GSM-R*.

Laŭ *Železničář* preparis *Jindřich Tomášek*
kontrolis *Heinz Hoffmann*